# NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (62).

Kotizoj (kun bultenservo)

| | | |
|---|---|---|
| a) | Junuloj | : 2 Fr. |
| b) | Aktiva membreco | : 3 Fr. |
| c) | Subtenanto | : 5 Fr. |

Fédération Espérantiste du Nord de la France,
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (62).
C.C.P. LILLE 517-15.

---

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (62).

---

Informilo n-ro 1 — Januaro-Februaro 1965

Federacia Renkontiĝo - Méricourt - 28/3/65

Estimataj Federacianoj,

La NFEF memorigas al vi sian printempan feston, kiu okazos en Méricourt-sous-Lens (vd. la programon en la decembra bulteno).
Rendevuo je la 10-a, ĉe Medicin-Socia Centro (Centre Médico-Social).
Je la horo 13-a : Kunmanĝo ĉe Trinkejo HERMANT, strato Pasteur.

Menuo : Aperitivo - Antaŭmanĝoj (rastitaj krudaĵoj, kuiritaj betoj, sekaj porkaĵoj, pasteĉo)
Rostita bovaĵo kun terpomoj k pizoj
Fromaĝpladaĵo - Kafo
Pokapa prezo : 8 F (la aliaj trinkaĵoj : vino aŭ biero estos aparte pagotaj).

Horo 15-a : Matineo (kunhelpos la urba muziksocieto k la akordionistaro) en la Urba Salono (t.n. "Salle Françoise").

Koran inviton al ĉiuj - NEPRE VENU KAJ VENIGU GEAMIKOJN!

Anoncu vin skribante al la ĉisuba adreso.

La Federacia Estraro.

Kongresaj Fervojrabatiloj : En okazo de bezono, mendu ilin kun reafranko al la loka respondeculino : S-ino Van PARYS, 83, Rue des Cerisiers, MERICOURT-sous-LENS (62).

Esperanta Tago ĉe la Lille-Foiro - 9-an de Majo 1965

Ĉijare, ĝi estos tiom pli interesa, ĉar la federacianoj povos vidi la faman suspensfilmon "Angoroj". Sekve, ni esperas, ke ĉiu propagandos tion k venigos ankaŭ eksterfederaciajn amikojn.

Provizora programo :

| | |
|---|---|
| 9.30 h | Rendevuo en la Honorhalo (C-halo). |
| 10.00 - 12.00 | Publika projekciado de la filmo "Angoroj" en la foira filmosalono. Skeĉoj kaj ludoj. |
| 12.15 h | Honorvino en la bankedejo, ĉe la unua etaĝo. |
| 12.30 h | Bankedo - Prezo : 15,00 F. |
| 15.00 h | Aferkunsido k eventuale ekzamenoj en la sama ejo. La salono restos je nia dispono ĝis la 20-a h. |

Ĉar la ĉefaj federaciaj aferoj estos jam priparolitaj en Méricourt, ni disponos multan tempon por amike babili.

La definitiva programo aperos en la proks. bulteno.

Konstanta Esperanto-budo funkcios dum la tuta foira daŭro.

---

Paska Kultura Semajno

De la 9-a ĝis la 16-a de Aprilo okazos en la Kastelo Grésillon Kultura Semajno sub la aŭspicioj de la Franca Ministerio pri Edukado.

Agregaciaj profesoroj, S-roj MARTIN kaj DUC GONINAZ prelegos kaj ĉiutage kursoj laŭ la rekta metodo kaj ludoj estos organizataj.

Profesoro PRAGANO de la Fakultato en Amsterdam, Akademiano, prelegos kaj gvidos kursojn.

Dimanĉon, la 11-an de Aprilo, la partoprenantoj vizitos la kastelojn de la Loire-regiono.

Francaj geseminarianoj kaj alilandaj gejunuloj partoprenos la Kulturan Semajnon.

Informojn donas Kastelo Grésillon, BAUGE (Maine-et-Loire) Francujo.

---

Daŭre pliriĉiĝas la Federacia Biblioteko :

La prizorganto (S-ro ODENT), atentigas pri jenaj pliaj prunteblaĵoj :

- Kiel Akvo de l' Rivero (R. SCHWARTZ).
- Monda Kulturo : ĉiuj aperintaj n-roj.
- La Diskoj de UEA :
  - a) Internacia Elparolado;
  - b) Fesparolado de D-ro LAPENNA en Hago;
  - c) Salutparoladoj en Hago.

Plie, nia Federacio fariĝis membro de la Internacia Federacio de Kampado kaj Karavanado, kaj ricevas ties bultenon, kiu do estas je la dispono de ĉiuj membroj. Oni skribu al S-ro ODENT, 17, Rue des Bouvreuils, ARRAS.

NIA VIVO

Calais (P.-de-C.).- S-ro BUERICK fariĝis komitatano de la Kalezia Kultura Centro, kies Asocia Membro fariĝis la Kaleza Kultura Centro Esperanto.
Tiu ĉi aktive partoprenas en la kolektado de subskriboj por la UEA-peticio. Ĝia nova sidejo estas : 58, Rue Gaillard, CALAIS (62).

Esperanto-Fako pliriĉigis la urban bibliotekon per kelkcento da libroj. Tie oni trovas tre rarajn dokumentojn pri la fruaj jaroj de nia lingvo.

S-ro J. DUCROCQ fariĝis landa reprezentanto por Francujo de la trilandaj renkontiĝoj (Markolaj Kongresoj).
Adreso : 199, Rue des 4-Coins, CALAIS (62).

Tourcoing.- Okazis ĉe la Kultura Centro debato pri la esperantista gazetaro, kiu nombras ĉirkaŭ unu milionon da legantoj en la tuta mondo.
La kotizoj por enurbaj kaj eksterurbaj simpatiantaj membroj estas jenaj :

ordinara membro : 2 F
membro kun prospekta abono : 3 F

ĝirotaj al :
Association Culturelle Tourcoing-Espéranto,
48, Rue Marc-Sangnier, TOURCOING (59).
C.C.P. LILLE 1995-97.

La loka rondo partoprenis ekspozicion per tri paneloj kaj inaŭguro de nova junulardomo "Les Orions".

---

Skribas al ni amiko

S-ro Jean HENIN, kiu iam soldatservis en Kongolando kaj poste laboris kiel asistanto pri franca lingvo en GLASGOW, skribas :
"La restado en Britlando pliriĉigis miajn Esperanto-sciojn, ĉar mi sukcese trapasis la mezgradan E-ekzamenon de la "Royal Society of Arts", kiel unuaklasa kategorio."
... Ni gratulas pro tiu sukceso kaj esperas, ke konforme al lia intenco li povos nun aktive partopreni en nia federacia movado.

Ni gratulas S-ron HENIN ankaŭ pro lia fianĉiĝo kun angla esperantistino, F-ino Helen GORST, nun asistantino pri angla lingvo ĉe la porknabina reallernejo en Doullens (Somme).

---

Adresŝanĝoj : S-ro HENIN Jean, antaŭe en Glasgow, loĝas nun en Oisemont (Somme) - C.E.G., 10, Rue de la Gare.
S-ro LENEL Jean, antaŭe en Hazebrouck, troviĝas nun en Perros-Guirec (C.-du-N.), D 131, Rue Edouard-Branly.
Calais S-ro BUERICK, antaŭe 41, strato Guerschell, loĝas nun 58, Rue Gaillard.

---

Traduka konkurso : La temo aperis en la 5-a numero (oktobro 1964) de nia informilo. Datlimo : 1/3/65. Respondeculo : L. GILOTEAUX, 7, Rue St-Saëns, WATTRELOS (Nord).
Premioj : noveldonaĵoj en Esperanto.

UEA-propono al Uno

La kolektado de subskriboj progresas. La esperantista sekcio de la Laika Amikaro de Hénin-Liétard prezentis la foliojn en tiu urbo k en Dourges, speciale al la instruistaro. Nuntempe, ni klopodas en Courcelles-les-Lens k Noyelles-Godault. Jen la plej gravaj atingaĵoj : aprobis la proponon k subskribis ĝin :

Hénin-Liétard : S-ro Fernand DARCHICOURT, Deputito-Urbestro kaj Kantona Konsiliano, kvin magistratanoj, S-ro PANTIGNY, beletra profesoro kaj literatura recenzisto, la estrino kaj dek profesoroj de C.E.G. Carnot, dudek geinstruistoj.

Dourges : ok geinstruistoj de la lerneja grupo Bruno.

Noyelles-Godault : S-ro BEUGNEZ Louis, Urbestro kaj eks-Deputito.

Bourbourg : Okaze de debato, la tuta urbestraro subskribis la proponon kaj voĉdonis favore al Esperanto.

Wattrelos : La loka respondeculo kolektis 260 subskribojn.

La aliaj kolektantoj estas petataj informi Lucien BOURGOIS pri siaj atingaĵoj.

FRANCAJ ESPERANTISTOJ !

Alproksimiĝas la momento de la municipaj elektoj. JEN LA PSIKOLOGIA, LA OPORTUNA MOMENTO por prezenti la UEA-proponon al la urbestraro de via loĝloko. SENPROKRASTE, NEPRE FARU TION !

Esperanto-Instruado :

Péronne (Somme) : S-ro LESAGE iniciatis kurson por liceanoj.

Méricourt (P.-de-C.) : S-ino Van PARYS, lernejestrino, gvidas du kursojn (marde kaj sabate).

Arras (P.-de-C.) : S-ro ODENT prelegos ĉe la porinstruista seminario, pri Esperanto.

Aŭtistoj !

Je iniciato de UEA, fondiĝis la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista. I.E.K.A. akceptas kiel membron ĉiun posedanton de aŭtomobilo, kaj kiel abonanton al ĝia organo "Aŭto-Revuo", ĉiun samideanon, kiu interesiĝas pri tiu fako.

La kotizo (por aŭtantoj), kiu inkluzivas la abonon, kaj la abono (por ne-aŭtantoj) estas Belgaj Frankoj 50 (14 steloj), kiujn oni povas pagi al la P.Ĉ. n-ro 1700-10 de Maurice JAUMOTTE, De Bruynlaan 44, WILRIJK-Antverpeno (Belgujo). - aŭ per steloj aŭ per respondkuponoj, kiuj valoras B. Fr. 6. Ankaŭ per banĉeko, sed, en tiu okazo, oni plialtigu la sumon pagotan per 10 % pro la, proporcie, altaj bankkostoj.

I.E.K.A. disponigas al siaj membroj belan metalan insignon, gluotan sur la vitron aŭ karoserion de la veturilo. Prezo : B. Fr. 20 (6 steloj).

Sur la sama kampo, UEA kreis specialan fakdelegitan kategorion : "SOS"-aŭtoservo, por membroj, kiuj pretas interpreti inter paneotrafitoj kaj riparejoj.

La Int. E-Klubo Aŭtomobilista IEKA organizas aŭtomobilan karavanan kunveturadon al la Eŭropa E-Konferenco en VIENO (18-24 Junio 65).

Partoprenontoj sin anoncu al S-ro Maurice JAUMOTTE.

## Jaro 1965 - Kalendaro de la ĉefaj Esperanto-kongresoj

Méricourt (Pas-de-Calais).- 28 Marto : Federacia Renkontiĝo. Respondecas : Ges-roj Van PARYS, 83, Cité des Cerisiers, MERICOURT (62).

Lille (Nord).- 9 Majo : Foira Esperanto-Tago. Informas : S-ro CURNELLE, 26, Rue des Martyrs-de-la-Résistance, LAMBERSART (59).

Le Havre (Seine-Maritime).- 5-7 Junio : 57-a Nacia UFE-Kongreso. Kongresinformejo: 33, Strato Saint-Michel, LE HAVRE (76).
Ankaŭ de UFE, 34, Rue de Chabrol, PARIS (X°) vi povas ricevi la programon.

---

Ostendo (Belgujo).- 5-7 Junio : Markola Kongreso (trilanda).
" " " : Nacia Belga Esperanto-Kongreso.

Düsseldorf (Germanujo).- 5-7 Junio : 43-a Germana Esperanto-Kongreso.

---

Vieno (Aŭstrujo).- 18-24 Junio : Eŭropa Esperanto-Konferenco.
Balatonalmadi (Hungarujo).- Post la ĉisupra konferenco : 3-a STELO-Semajno.
Amsterdamo (Nederlando).- 31 Julio-7 Aŭg. : Internacia Junularkonferenco pri "Komunikado", en Anne-Frank-Domo.
Karlsruhe (Germanujo).- 31 Julio-7 Aŭg. : Internacia SAT-Kongreso.
Tokio (Japanujo).- 31 Julio-7 Aŭg. : 50-a Universala Kongreso de Esperanto.
Kioto " .- 8-13 Aŭg. : Postkongreso.
Ootu " .- 8-15 Aŭg. : 21-a Internacia Junularkongreso de TEJO.

---

Pri la SAT-kongreso oni rekte skribu al SAT, 67, Avenue Gambetta, PARIS (20°).

Pri la 6 aliaj ĉisupraj manifestacioj informas : UEA, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM- 2 (Nederlando).

---

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

a) Paska restado.- 9-16 Aprilo : 4-a Kultura Semajno.

b) Someraj sesioj.- 4-25 Julio : Preparado por la 3 ekzamenoj.

25-Julio-8 Aŭg. : Turismaj kaj kulturaj ferioj internaciaj.

8-29 Aŭg. : Esperantistaj kaj kulturaj semajnoj.

29 Aŭg.-12 Sept. : Studrestado.

Informas : MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE, Château de Grésillon, BAUGE (49).

---

## Hungara prelegisto

Grupoj aŭ unuopaj aktivuloj, kiuj estas pretaj gastigi Profesoron E. FARKAS, el Budapeŝto, kaj eventuale organizi konferencon aŭ debaton, estas petataj rilati kun UFE, 34, Rue de Chabrol, PARIS (X°).

La hungara samideano intencas viziti Francujon inter la 8-a de junio kaj la 13-a de aŭgusto.

Oni parolas pri ni : La 6-an de decembro 64, en la dimanĉa magazino "Sub la Verda Stelo", Radio-Varsovio raportis pri la artikolo "La Gazetaro kaj Ni" aperinta en la oktobra numero de "Norda Gazeto".
Kompreneble, la enhavo de nia fed. informilo estas je la tuta dispono de niaj polaj kolegoj.

Pola Radio komunikas : Se vi posedas en - aŭ eksterlande korespondamikojn kaj dezirus saluti ilin en nia ĉiumerkreda "Koncerto kun bondeziroj" sufiĉas nur skribi i[illegible]jn antaŭnomojn, nomojn kaj precizajn adresojn kaj sendi la liston al nia redakcio. La saluto-tekston vi povas mem verki kaj proponi iun konatan muzikaĵon aŭ kanton /povas esti Esperanta/.
Tiajn salutojn ni elsendas sen[illegible]ge, kaj pri tago de koncernaj salutoj ni antaŭsciigas ĉiun salutoton perletere.
Skribu al : Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, WARSZAWA, Pollando.

Radio Varsovio disaŭdigas ĉiutage, de la horo 16,30 ĝis la horo 17-a en Esperanto la[illegible] je[illegible]j ondolongoj : 31,01 m - 31,45 m - 41, 18 m - 41,99 m - 42,11 m - 48, 90 m - 50,42 m kaj sur la meza ondo 200 m.

Ni salutas novan esperantan sendstacion :

Radio Pekino disaŭdigas en la internacia lingvo dufoje ĉiusemajne, vespere en ĉiu vendredo kaj sabato (sama programo ripetata) de la horo 20-a ĝis la horo 20.30 (laŭ la horsistemo de Greenwich), laŭ la ondolongoj : 51,40 m - 40,4 m kaj 30,1 m.
Skribu alla jena adreso : Esperanto-Fako, Radio Pekino, PEKINO, ĈINIO.
La detalan programon de la Esperantaj elsendoj vi trovos en la revuo "ESPERANTO" (januaro 1965).

Alvoko por ekspoziciinda materialo :

Ĉiuj Federacianoj, kiuj deziras kontribui en la aranĝo de la Ekspozicio prezentota al la ĝenerala publiko en Méricourt, bonvolu rilati kun Ges-roj Van PARYS (83, Cité des Cerisiers, Méricourt/Lens (62), kiuj sindoneme alprenis la taskon ĝin organizi, kaj poste agos kiel konstantaj prizorgantoj de la Federacia Ekspozicio-materialo.

GRAVE

Nun estas oportuna tempo (se vi ankoraŭ ne faris) por sendi al la kasisto vian kotizon por 1965.
Plie, se ĉi tiu numero de "Norda Gaz[illegible]o" surhavas ĉi tie : ---- ruĝan krucon, tio signifas, ke vi NE pagis vian kotizon por 1964.
Se estas tiel, vi montros vian daŭran interesiĝon pri nia laboro, TUJ sendante vian (modestan) kontribuaĵon al la federaciaj elspezoj.
Laŭplace vi povas utiligi : aŭ poŝtmandaton, aŭ ĝirĉekon, aŭ simple alsendi poŝtmarkojn.

La Federacia estraro.

---

Bulteno ofsete presita de : Centre National Espéranto-Office, 9 bis, Rue du Commandant-de-Poli, Orléans (Loiret).

Le Gérant Resp. : Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).